

LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Ĉefredaktoro: Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung; Robert Kreuz, LK.; Prof. D-ro Ing-ro R. Orengo. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114)

VOLUMO I * N-RO 1

FEBRUARO 1932

Stranga fakto estas, ke, inter la multaj Esperantaj gazetoj, ĉiam mankis revuo destinita por lingvaj demandoj. Antaŭ la monda milito iagrade kompensis tiun mankon la ekzisto de la „Oficiala Gazeto“, kiu enpresis ankaŭ lingvajn studojn, sed ĝi malaperis, kaj ĝin anstataŭas nek „Esperanto-Praktiko“, nek la „Oficiala Bulteno de la Esperanta Akademio“, kies taskoj estas tute malsamaj.

Nun, pro la iniciato de s-ro La Colla kaj la aktiva interesiĝo de la Itala Esperanto-Centro en Milano, de ICK en Genevo kaj Heroldo de Esperanto, la bedaŭrinda manko estas forigita: estu dankataj s-roj R. Orengo, R. Kreuz kaj T. Jung.

*

La celo de „Lingva Kritiko“ ne estas proponi reformojn de Esperanto, kion la Redakcio konsideras same ridinda afero, kiel proponi plibonigojn por natura lingvo: oni kritikos ne la lingvon mem, sed la manieron, kiel ĝi estas uzata de niaj verkistoj kaj verkantoj.

Tial ke Esperanto ne estas ludilo por teoriemuloj, ĉiuj artikoloj estu bazitaj sur la metoda scienca esplorado de nia literaturo, kun speciala atento pri la Zamenhofa uzo. La Fundamento kaj la decidoj de la Lingva Komitato restu ekster diskuto: ili estu la firma kaj fortika subkonstruaĵo, sur kiu staru la harmonia organismo de nia lingvo.

Ni celas la oran mezan vojon, kaj pro tio ŝajnos tro konservemaj al iuj novemuloj, tro novemaj al iuj konservemuloj. Sed ĉar la ĉefa celo estas la unueco, kaj estas pli facile atingi la unuecon konservante kaj disvolvigante la jam ekzistantajn ĝermojn ol akcelante facilajn novaĵojn, verŝajne ni pli ofte ricevos la unuan riproĉon — kaj ĝin ne konsideros mallauda.

La bazo de Esperanto estas ĝia gramatiko, konsiderinde pli facila ol tiu de iu nacia lingvo, sed en la detaloj ne ĉiam egale interpretata de la diverslingvaj uzantoj de Esperanto. Aŭskulti kaj kritike ekzameni la opiniojn de diverslingvaj kompetentuloj, fari niajn konkludojn kaj, fine, kiel rezulton de nia laboro, prezenti al la uzantoj de Esperanto gramatikon, kiu donu informon kaj konsilon en plejble multaj dubaj kazoj, — jen la tasko de la gramatika parto de nia revuo.

Ne malpli grava estos la kontrolado de la evoluo de nia komuna kaj teknika

vortaro. En la komuna vortaro oni speciale atentos la ĉiam plimultiĝantajn neologismojn: la kelkajn necesajn ni favoros: la nenecesajn, ofte senpripense proponitajn pro ia mensa mallaboremo aŭ snobisma novamo, ni kontraŭbatalos.

Aliaj faktoj estos: pri la Esperanta stilo, pri ĝenerala lingvistiko, pri la svarmantaj projektoj de lingvo internacia kompare kun Esperanto, lingva „libera tribunalo“.

Fine, gravan lokon havos la recenzoj pri libroj kaj revuoj, nur de la stila, gramatika, leksikologia vidpunktoj: verkistoj kaj eldonantoj ne atendu laŭdojn kaj gratulojn pro sia kuraĝo, entreprenemo, fantazio, ktp., sed juĝon justan kaj egalaniman pri la uzita lingvaĵo.

Resume, „Lingva Kritiko“ estu serena diskutejo, ĉar ni ne ŝatas la dogmon, sed la diskutoj restu inter certaj limoj: tiuj postulitaj de la ŭtilo de nia lingvo.

„Lingva Kritiko“ ne estas oficiala organo, sed — tute ne konkurante kun

la „Oficiala Bulteno“ — ĝi regule publikigos la komunikaĵojn de la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio, kies aŭtoritato ĝi plene rekonas; la Redakcio firme esperas, ke ĝia laboro ne estos sen ŭtilo kaj profito por niaj lingvaj institucioj kaj por la progresado de Esperanto.

La Redakcio.

*

Ni petis Akademianon D-ro B. Migliorini, profesoron ĉe la Roma Universitato kaj ĉefredaktoron de *Enciclopedia Italiana*, preni sur sin la gvidadon de „Lingva Kritiko“. Li bonvole akceptas ĝeneralan kontroladon pri la afero, kvankam, pro la multaj okupoj, li devas komplete lasi la zorgon de la korespondado al la ĉefredaktoro s-ro La Colla, LK., redaktoro de *Enciclopedia Italiana*. S-ro Teo Jung, ĉefredaktoro de Heroldo de Esperanto, speciale redaktos la gramatikan parton.

La Redakcio respondos nur pri la nesubskribitaj artikoloj aŭ pri tiuj subskribitaj per ĝia nomo; pri la aliaj respondos ekskluzive la verkintoj.

„Helpa“ lingvo.

Oni ofte aŭdas, de la ĝenerala publiko, komparojn inter Esperanto (aŭ ĝenerale la artefaritaj lingvoj) kaj la naturaj lingvoj, pri prononcado, pri vortriĉeco, ktp.

Nu, tia komparado estas ebla kaj ŭtila nur en certaj limoj: t. e. se oni konsideras ambaŭ komparelemojn laŭ la sama funkcio, tiu de helplingvoj.

La dialektoj estas, laŭ sia amplekso, nur lokaj aŭ regionaj esprimilaroj; la lingvoj, laŭ la kutima senco de la vorto, estas naciaj esprimilaroj. Dialekto estas taŭga por sia celo, lingvo por sia, kaj estus neoportune kaj nesaĝe kompari ilin ne konsiderante tiujn celojn, t. e. la funkciojn, kiujn ili devas plenumi. Tute same estus malĝuste kompari senkondiĉe la naciajn kaj internaciajn lingvojn ne konsiderante iliajn diversajn funkciojn.

Esperanton oni ne povas kompari kun franca, kun angla, kun latina lingvoj absolute, sed kun franca, kun angla, kun latina lingvoj funkciantaj kiel helplingvoj: t. e. ekzemple kun la franca lingvo kiun uzas kune du kongresanoj hispana kaj japana, aŭ tiel plu.

Multaj argumentoj de la kontraŭuloj de la lingvo internacia rompiĝas kontraŭ tiu ĉi rimarko. Ekzemple, kiam oni diras, ke oni ne povas atingi sufiĉe egalan prononcadon, ni povas respondi, ke la samo okazos por la naturaj lingvoj en la funkcio de helplingvoj: sed ke la internaciaj lingvoj estas konstruitaj konsiderante tiun malfacilaĵon,

kio estas nepra avantaĝo. Estas konataj la ŝercoj pri la fakto ke anglalingvanoj kaj suditaloj prononcas ju anstataŭ i: ĝuste pro tia malfacileco Esperanto ne havas i. (Ankaŭ Volapük estis adoptinta la saman principon, sed ĝiaj aplikoj estis tre strangaj: ĝi eliminis r, por helpi la Orientanojn, kaj aliflanke akceptis ŭ kaj ŝ, kaj devigis distingi inter e kaj a!)

En la morfologio, la distingo de kelkaj verbformoj estas por iuj popoloj tre malfacila: la teŭtonidoj (= ĝermanoj) ne distingas imperfekton kaj perfektan (france *j'avais, j'eus*), la latinidoj kaj la teŭtonidoj sukcesas nur kun granda peno lerni la distigon inter perfektivaj kaj neperfektivaj formoj de la slavoj. Tio kaŭzas en la uzado de naciaj lingvoj kiel helplingvoj multe pli gravajn malfacilaĵojn ol la uzado de Esperanto, laŭcele simpligita.

En la vortrezoro, la vortoj kun pluraj signifoj (ekz. france *louer* „lui“ kaj „laŭdi“) donas al la nacioj nur tolereblajn maloportunaĵojn, sed en la internacia uzado ili povas okazigi ridindajn strangaĵojn kaj erarojn. Sed eĉ pli grava estas la danĝero de la tiel nomataj paronimoj (aŭ „falsaj amikoj“), t. e. de la vortoj, kiuj, sub sama aŭ simila formo, havas malsaman signifon en diversaj lingvoj. Ekz. franco kiu trovas la vorton *surname* en angla lingvo kvazaŭ instinkte tradukas *surnom* — kaj eraras. Oni jam citis la faman diferencon inter la du oficialaj tekstoj en la 10-a artikolo de la

Kontrakto de la Ligo de Nacioj: laŭ la angla teksto la Konsilantaro devas, okaze de atako, advise upon the means, t. e. „doni konsilojn pri la rimedoj“; laŭ la franca ĝi *avise aux moyens*, t. e. pripensas havigi la rimedojn“.

Kompreneble, tiu risko ekzistas ankaŭ en la artefaritaj lingvoj, sed en ilia konstruado oni povas zorgi ĝin igi kiel eble malplej danĝera. Kaj efektive en Esperanto ni havas la eblecon akurate difini la vorton per la komparo de la oficialaj tradukoj kaj per la difinoj kaj ekzemploj de la neoficialaj vortaroj, dum ekz. Latino sine flexione (= Interlingua) kaj Occidental, kiuj zorgis la internaciecon de la formoj multe pli ol la internaciecon de la signifoj, ne havas tiun eblecon.

Fine, la granda riĉeco da sinonimoj en la naciaj lingvoj, kiu estas nepre stila avantaĝo en la nacia uzado, fariĝas malavantaĝo en la internacia. Por la praktika uzado, estas piii utile havi antaŭ si nur unu formon, anstataŭ kvar aŭ kvin nuancojn, inter kiuj oni devas elektii. Tiun principon sekvis Zamenhof, kaj ni ne devas ĝin forgesi. Esperanto devas havi ne tiom da nuancoj kiom postulas nacia lingvo en nacia uzado, sed kiom ĝi postulas en internacia.

Bruno Migliorini, LK., Ak.

Scipovi lingvon ...

La pordisto de l' hotelo fiere diris al mi: „Mi scipovas sep lingvojn.“ Kaj tiu bela parolo memorigis al mi frazon de Meillet, la fama franca lingvisto: „La klasika franca estas lingvo nun skribata de malgranda minorito, kaj parolata de preskaŭ neniu.“ Evidente la servisto kaj la sciencisto ne esprimis la saman aferon sub la sama vorto. Por la unua oni scipovas lingvon, se oni kapablas per ĝi anonci la manĝorojn aŭ la ĝustan vojon, informi, ĉu pluvas aŭ ĉu jam alvenis la gazetoj. Por la dua, scipovas lingvon tiu, kiu kapablas esprimi per ĝi plej ekzakte ian ajn penson, kaj koni kaj korekte uzi ĝiajn nuancojn kaj delikataĵojn.

Ni devas konfesi, ke tro ofte la esperantistoj dividas la opinion de mia pordisto, kaj parolas kaj instruas ian „kelneran“ Esperanton, kiu estas pli proksima al signalkodo ol al literatura lingvo. Precipe la propagandistoj ŝategas tiun vidpunkton, kaj ne havas pli grandan deziron, krom lingvo, kies gramatikon oni povus loki sur koverton kaj vortaron sur vizitkarton.

Tia tendenco estas grava pro siaj konsekvencoj: al ĝi, al tiu kutimo krii en la stratoj, ke la lingvo kalkulas nur 16 senesceptajn regulojn, kaj povas esti lernita per dek aŭ dudek lecionoj, oni ŝuldas la malfidon de la intelektaj medioj. Per tiu blufi pri simplegeco oni naskis ĉe la prudentaj homoj la suspekton, ke tiel facile akirebla lingvo povas esti nur elementa parolrimedo, barbara ĵargono por krudaj turistoj aŭ senkulturaj komercistoj.

Nu, ĉiu konsentos, mi kredas, ke Esperanto venkos, nur se ĝi konkeras al si la intelektajn sferojn, universitatojn, akademiojn ktp. Tial mi opiniis necese altiri la atenton de la esperantistoj al la relativa komplekseco de ĝia lingvo kaj rapide studi ties kaŭzojn. Per kelkaj artikoloj mi penas do tragardi el tiu vidpunkto la nunan staton de nia lingvo, kaj mi provos, de mia propra flanko, respondi tiun multfoje faritan demandon: „Tiu Esperanto, ĝi estas tiel facila, vere?“

G. Waringhien, LK.

Ĉu vi konas sinjoron Bojkot'?

Lingva babilaĵo de Paul Bennemann, Leipzig, Germanujo.

Multaj sciencaj verkoj pritraktas la problemon, kiel naskiĝis la vortoj de la lingvoj. Efektive, estas interese ekscii, kial certa objekto nomiĝas (en germana lingvo) „Zahn“, alia (en angla) „husk“, alia (en franca) „chaise“ ktp. Teorioj estas starigitaj, por solvi tiun ĉi problemon, kaj oni kredas jam esti trovinta por kelkaj vortoj la kaŭzon de l' estiĝo; pri aliaj la disputoj ankoraŭ daŭras kaj verŝajne daŭros eterne.

Ni pritraktos ĉi sube similan temon, nome la strangan fenomenon, ke propraj nomoj, t. e. nomoj de personoj, urboj ktp. fariĝis ordinaraj vortoj de nia lingvo. Ni uzas ilin apud aliaj nesciante pri tiu ilia aparta kvalito.

Verŝajne vi ne scias, kial la pralino nomiĝas „pralino“ kaj kial la mirabelo (ne „mirabelo“, mi petas!) ricevis ĝuste tiun ĉi nomon; kaj sinjoron Bojkot' vi certe ne bojkotis, ĉar vi ne konas lin. Nu, mi volas konatigi vin kun li kaj kun tuta aro da aliaj interesaj homoj, kiuj vivas ankoraŭ en vortoj de nia lingvo; kaj samtempe vi lernos iom el la kulturhistorio, lernos senpene per anekdotoj kaj historietoj — ĉar ni verŝajne interkonsentos pri tio, ke prilingva artikolo ne devas nepre esti teda por nefakaj spiritoj, ĉu ne?

Tre klare vi povos ekkoni la preparolotan aferon per simpla ekzemplo, kiun vi ĉiuj konas. La germana grafo Zeppelin (1838—1917) eltrovis direkteblan aerŝipon, kiun laŭ li oni nomis Zeppelin-aerŝipo. Hodiaŭ oni parolas en ĉiuj landoj mallonge pri zepelino — la nomo de la homo transiris al lia kreitaĵo. (Interese estas, ke la nomo de la grafo devenas de la nomo de malgranda vilaĝo Zepelin en norda Germanujo, kie sidis la prapatroj de la familio; sed tio ne apartenas al nia temo.)

Multaj aliaj vortoj estas same klarigeblaj, pri kio instruu nin la sekvantaj ekzemploj. Adolphe Sax el Dinant (Belgujo, 1814 ĝis 1857), profesoro ĉe la konservatorio en Paris, konstruis la saksofonon, kiu do ne estas novaĵo de la moderna ĵazbando. La nomo de la germana inĝeniero Benz, kiu en 1885 konstruis la unuan motorveturilon, estas eternigita en benzino. Kiam oni bezonis en la granda franca revolucio rapide kaj bone funkciantan senkapigilon, la franca kuracisto Guillotin (1738—1814) rekomendis maŝinon eltroviton de la kirurgo Louis. Tial oni nomis tiun simpatian mekanismon kelkfoje ne gilotino, sed Louise. La germana forŝtisto Drais konstruis en 1817 la prabicyklon; la drezino similas ĝin jam ne multe. Jean Nicot de Viblemain alportis semerojn de la tabakplanto el la ĝardenoj de la portugala reĝo Francujon. Pro lia honoro Dalechampes nomis (1586) tiun planton „herba nicotiana“; kaj la venena alkaloido en la tabakplantoj nun estas la nikotino. Ankaŭ franco estis la arkitekto (1646—1708), kiu komencis konstrui loĝejojn en la subtegmento, la mansardojn.

La Earl of Sandwich, vivinta en la 18-a jarcento, estis tiomgrade ludema, ke li ne volis forlasi la ludotablon, por manĝi. Tial li ordonis, prepari por li malgrandajn bulkopecojn kun butero kaj iuj suraĵoj, kiujn li povis manĝi, sen interrompi la ludadon. Honoron al la eltrovinto de la sandviĉoj! Ankaŭ aliaj herooj de la kulinara arto eniris la panteonon de la lingva eterneco: La pralinojn ekz. eltrovis por la frandemulo-

marŝalo Du Plessis-Fraslin (mortis 1675) lia kuiristo; kaj nekonata itala sukeraĵisto komponis unuafoje pastelojn, kiujn la Firenze-ano Pastilla poste importis en Francujon jam en la 16-a jarcento.

Sed precipe la fizikistoj honoris kaj honoras la korifeojn de sia fako, farante iliajn nomojn esprimoj de la teknika lingvo. Ekz. galvanismo, volto, ampero, omo konservas la nomojn de la itala anatomiisto Galvani (1737—1798), de la itala grafo Volta (1745—1827, konstruinto de la unuaj elektraj elementoj), de la franca matematikisto kaj fizikisto Ampère (1775—1836) kaj de la germana profesoro Ohm (1787 ĝis 1854).

Same multaj plantoj portas la nomojn de homoj: La kuksiion trovis Leonhard Fuchs ĉirkaŭ 1540 en Meksikio, kaj el la sama lando la sveda botanikisto Dahl kunportis ĉirkaŭ 1780 la dalion. La itala misiisto Camelli importis la kameflion el Japanujo. La begonio, georgino kaj magnolio estas nomitaj laŭ Michael Begon, Georgi (Peterburgo) kaj Magnol (franco).

Ankaŭ inter la monatoj ni trovas multajn nomojn, kiuj antaŭe apartenis al personoj, precipe mitologiaj. Julio estis la antaŭnomo de la roma konsulo Caesar (kies nomo cetere ankaŭ vivas en caro). Tiu granda strategiisto ankaŭ reformis la kalendaron kaj tial certe meritas honoran lokon inter januaro (Janus, la duvizaga roma dio, honorita kiel reganto de l' jaro), marto (Mars, la roma dio de l' milito), majo (Maja, la diino de ĉiu kresko) kaj junio, en kiu ni rekonas la nomon de la diino Juno, la edzino de Jupitero.

El la mitologio devenas ankaŭ la nomo de l' morfino (Morpheus estis la greka dio de la sonĝoj) kaj de la narciso: laŭ greka legendo ĝi elkreskis el la sango de la bela junulo Narcissos, kiu mortis sekve de ampasio al si mem. La diino Flora donis sian nomon al la tuta mondo de la floroj.

Ni reiru ankoraŭfoje al la tekniko. La familio Gobelin liveris por Henriko IV-a tiujn teksitajn bildotapiŝojn, kiujn ankoraŭ hodiaŭ ni nomas goblinoj; kaj la filandro Batiste Chambray jam en la 13-a jarcento teksis batiston.

La nomo de du angloj restos por ĉiam ligita kun du militiloj: Henry Sharpnell (1761—1842) eltrovis la ŝrapnelojn; kaj la kolonelo Thomas Tankburn konstruis la tankojn, tiujn terurajn maŝinojn, kiuj helpis decidi la lastan militon.

Ne ĉiam tiu transiro de persona al genra nomo indikas meritojn de l' unua posedanto de la nomo; ĝi povas eĉ transdoni al la tradicio ion, kion la rilata persono pli volonte kaŝus — se ĝi ankoraŭ povus protesti. Ĉu la antikva reĝo Mausolus (377—353 a. Kr.) havis grandajn meritojn, mi ne povus eltrovi. Sed la grandioza tombomemonto, kiun lia edzino konstruigis por li en Halikarnassos kaj laŭ kiu tiaj konstruaĵoj ankoraŭ nun estas nomataj maŭzoleoj, konservis lian nomon. Kaj Grog! Grog estis la moknomo de angla admiralo, Vernon, kiun li ricevis de siaj soldatoj, ĉar li donis al ili anstataŭ pura rumo nur miksaĵon el rumo, sukero kaj varmiga akvo, la grogon. Ankaŭ Etienne de Silhouette, supera kortega oficisto de Ludoviko XV-a, havis malbonan famon ĉe la popolo. Tial oni nomis ĉion, kio aspektis malriĉe, mal-

pompe, mizere, Silhouette-ajo („chose à la Silhouette“); kaj tiu nomo algluigis por ĉiam al la tiutempe populariĝantaj portretoj de-segnitaj (aŭ tranĉitaj) laŭ la ombro de vizaĝo-profilo, la **siluetoj**.

Ankaŭ verboj kaj eĉ adjektivoj estas derivitaj de personaj nomoj. Ni **makadamas** la ŝoseojn laŭ ideo de la skoto McAdam (1756—1836), kiu estis inspektisto por voj-konstruo en sia patrolando. Nun mi prezentos al vi ankaŭ la honorindan sinjoron Charles C. Boykott, pri kiu demandas la superskribo de mia artikolo. Boykott estis ĉirkaŭ 1880 bienestro en Irlando; kaj li tiel premis la farmistojn, ke la loĝantaro de la tuta regiono kunligis sin kontraŭ li tiel, ke li ne plu ricevis ion de ju, ankaŭ ne laboristojn; oni ne aĉetis de li; eĉ la fervojo rifuzis, transporti liajn brutojn. Oni **bojkotis** lin tiom longe, ĝis li elmigris.

Mi tre avertas vin, **linĉi** jun, se vi ne havas la samajn privilegiojn kiel la amerika juĝisto John Lincoln. Por ĉesigi la multnombrajn krimfarojn de negroj, kiuj en la 17-a jarcento timigis tie la popolon, oni donis al tiu viro la rajton, punmortigi kaptitajn krimulojn sen ordinara juĝa proceduro. Ne donu ankaŭ **drakonajn** ordonojn! Alie vi fariĝus same malsimpatia al viaj kunvivantoj kiel la greko Drako, kiu en 621 a. Kr. eldonis civilan kodon kun severegaj leĝoj.

Ke ankaŭ geografiaj nomoj fariĝis genraj nomoj, ni mirigos nin. Ĉu ne estas nature, ke objekto estas nomata laŭ la lando, regiono, urbo, kie ĝi estas farata, el kiu ĝi estas eksportata? Nu: la **fezon** oni portas en Fez, la ĉefurbo de Maroko; kaj en la sama lando oni fabrikas **marokenon**. **Muslino** venis el Mossul, **kalikoto** el Kalikut (Hindujo), **gazo** el Gaza (Palestino) kaj **tulo** el Tulle en Francujo. Al la **kroatoj** ni ŝuldas (laŭdire) la **kravatojn**. La **agaton** oni trovis (laŭ Plinius) unue ĉe la rivero

Achates (Sicilio), la **alabastron** ĉe Alabastron (Egiptujo), la **magnetŝtonon** en la greka distrikto Magnesia, **kupron** sur la insulo Cipro (greke: Kypros). La **florenoj** estas unue stampitaj en Firenze (latine: Florentia), la **heleroj** en Hal (Germanujo). **Majolikon** oni fabrikis (ĉu ankoraŭ fabrikas?) sur la hispana insulo Majorko, **fajncenon** en Faenza (Italujo), **pistolojn** en Pistoja (Italujo), **bajonetojn** en Bayonne (Francujo), **pergamemon** en Pergamon (antikva Malgrandazia), **damaskon** en Damasko (Sirio). La **persikoj** venis al ni el Persujo, la **mirabelo** el Mirabeau (Francujo) kaj la **kaŝtano** verŝajne el Kastana (ĉe la Nigra Maro). **Baldakenoj** estis farataj el ŝtofoj el Bagdad. La unuaj **fazanaj** estis ĉasataj — kaj manĝataj — ĉe la rivero Phasis (Kolhis).

Mi povus paroli ankoraŭ pri lazaretoj, akademioj kaj la laterano, pri mazaruko kaj tarantelo, pri derbio kaj jokeo, pri marĉpano kaj kolofono, beginoj kaj jezuitoj, arlekenoj kaj marionetoj, landaĵoj kaj iliaj kuĉeroj ktp. ktp. Ili ĉiuj ja apartenas al mia temo: ĉar ĉiuj ĉi vortoj devenas de propraj nomoj.

Sed sufiĉe por la nuna fojo tiu malgranda elekto, kiu montras, kiom interesa estas la historio de multaj vortoj kaj kiom ili rakontas el pasintaj tempoj — al tiu, kiu scias ilian kaŝitan lingvon.

Rim. de Red.: Eble interesos niajn legantojn scii, ke Prof. B. Migliorini verkis tutan libron pri tiu temo, kun centoj da ekzemploj kaj modela scienca esplorado, sub titolo **Dal nome proprio al nome comune**, Genève, Olschki, 1927, en 8°, paĝoj 357; prezo sv. fr. 20. Kelkaj el la cititaj etimologioj estas diskutablaj; eble s-ro Migliorini bonvolos iam eldiri sian aŭtoritan opinion.

Pri la uzado de „kio“ kiel relativo.

De Meguru Takahaŝi.

Laŭ la komentario de l' ĝisnunaj gramatikistoj **kio** estas relativpronomo uzata nur kaj ekskluzive en la du kazoj:

I. se ĝi rilatas al korelativa vorto, kiu finiĝas per **o**, kaj

II. se la rilatato estas tuta frazo ĝenerale.

Nun ni prezentu al ni la uzadon de „was“ en la germana lingvo; oni uzas **was als relatives Fürwort**, kiam ĝi rilatas

I. al neŭtra pronomo:

- Das ist alles, was ich gesehen habe.
- Vieles, was er behauptet hat, ist nicht richtig.

II. al tuta frazo ĝenerale:

- Er lacht stets, was ich nicht begreifen kann.
- Sie schrieb für eine Zeitung, was ihr etwas Geld einbrachte.

III. al neŭtra adjektivo substantivigita,

- Das ist das Beste, was ich tun kann.
- Sie singen von allem Hohen, was Menschenherz erhebt.

Al Esperanto do mankus uzado de **kio**. Kiu respondas por la kazo III de l' was-uzado, kiel: Das ist das Beste, was ich tun kann. Kiel nia Majstro sukcesis pleni tiun ĉi manklok en la tradukado de „Märchen von Andersen“, „Die Räuber“ kaj ceteraj germanaj verkoj? Por solvi la problemon,

mi esploris kun grandaj penoj ĉiujn verkojn de Zamenhof, kaj trovis tre interesan fakton, ke li enkondukis en Esperanto la koncernan uzadon ĝuste tia, kia ĝi estas en la germana lingvo!

Jen sekvas multaj ekzemploj:

La Batafo de l' Vivo:

21/27 — La sola, kion li klare vidis, estis tio, ke la nova elemento, kiun Snitchey kaj Craggs ordinare enportadis en tiujn ĉi interparolojn, faradis ilin nur pli nekomprenablaj...

Georgo Dandin:

51/5 — Kiam oni, simile al mi, edziĝis kun malbona virino, tiam la plej bona, kion oni povas fari, estas iri ĵeti sin en la akvon, la kapon antaŭen.

La Rabistoj:

6/23 — Se min ne ligus nerompebla promeso ne kaŝi antaŭ vi eĉ la plej malgrandan, kion mi povas eksci pri la sorto de via frato, plej kara amiko, neniam mia senkulpa plumo fariĝus tirano kontraŭ vi.

111/19 — Per Dio! mi tion ĉi faris, kaj per la diablo, ĝi ne estas la plej malbona, kion mi faris en mia vivo.

Originala Verkaro:

229/29 — Sed la plej grava, kion ni ĉiuj

devas kunporti kun ni al la kongreso, estas paco kaj recipoka amo kaj toleremeco.

370/19 — la sola, kion ili deziras, estas nur, ke oni lasu ilin trankvile vivi.

463/29 — La sola, kion mi timis, estis nur, ke la Komitato eble donos al sia decido nesufiĉe pripensitan kaj nesufiĉe singardan formon.

Fabeloj de Andersen I:

91/19 — tio estas la plej ĉarma, kion oni povas havi en la mondo, kaj tio estas la plej alta celo de miaj deziroj!

98/4 — La unua, kion ili aŭdis en ĉi tiu mondo, kiam oni forprenis la kovrilon de la skatolo, en kiu ili kuŝis, estis la vorto: »stanaj soldatoj!«.

113/20 — tamen tio estis la plej agrabla, kion oni povis al ĝi donaci.

Fabeloj de Andersen II:

17/28 — Tio estas la sola, kion ŝi scipovis, sed ŝi ludadis tion per unu fingro.

94/35 — La sola, kio laŭ ilia aserto mirigis ilin, estis tio, ke ili facile komprenis la lingvon.

Fundamenta Krestomatio:

22/9 (F. I. 70/24) — Ĉu mi estas malsaĝa? Ĉu mi ne taŭgas kiel reĝo? tio ĉi estus la plej terura, kio povus al mi okazi.

50/26 (F. I. 61/25) — La plej bonan, kion vi posedas, mi volas ricevi por mia kara trinkaĵo!

55/22 (F. I. 65/5*) — la servanto de la ŝipo alproksimiĝis al ŝi kaj la fratinoj subakviĝis, tiel ke li pensis, ke la blanka, kion li vidis, estis nur ŝaŭmo sur la akvo.

258/16 — oni venadis fine al la plej speciala, kion oni volis esprimi en tia maniero.

316/10 (O. V. 312/15) — La dua, kio sekvas el ĉio, kion ni supre diris, estas la sekvanta.

Tia uzmaniero de **kio** estas pleje trovata en la elgermanaj tradukoj, do ĝi estas germandevena, germanlingveca; sed tio tute ne rajtigas al ni forrifuzi ĝin kiel germanismon; la problemon estas, ĉu ĝi estas enkondukebla en nia lingvo aŭ ne.

Kompleta Gramatiko de Paul Fruictier rimarkigas prave pri la uzado de adjektivo:

78. Substantive oni ordinare ne uzas adjektivon. Tamen tion oni faras iafoje, kiam oni povas subkompreni al la adjektivo konkretan substantivon. »Tre volonte, mia bona«, diris la bela knabino, (Z.) subkomprenu: virino. Rim. Oni diras: La Bona, La Belo, La Vero ktp. per substantivo, kaj nu La Bona, La Bela, La Vera, ĉar tie ĉi oni ne povas subkompreni konkretan substantivon. (P. 28.)

Tiel la de mi cititaj ekzemploj ŝajnas ofendi tiun ĉi regulon, ĉar en ili neniu konkreta substantivo estas subkomprenata al la plej..., la sola, la unua ktp. Sed regulofendiĝo ne fariĝas en efektiveco, mi opinias. Kial? Ni devas meti nian atenton sur tion, ke tiuj adjektivoj, kiuj akompanas, kiel ordinare, la difinitan artikolon, estas pro tio difinitaj rilate al la signifo, kaj ke la relativa pronomo **kio** difinas de sia flanko la abstraktaĵojn esprimatajn de ili. Kaj tiuj ĉi du faktoroj kunhelpas por ebligi la tiel-

*) En F. I. 65/5 oni trovas la blankajon, kion anstataŭ la blanka, kion.

nomatan substantivan uzadon de adjektivo nur en la formo **la** (superlativa aŭ signife difinita) adjektivo, **kio**, spite tion, ke tie neniu konkretaĵo estas subkomprenebla. Tia estas mia logiko.

Se ĝi estas trafa, **la blanka**, kion (F. K. 55/23) estas forigenda restaĵo de germanismo. Ke la kriplan formon anstataŭas (je nia granda ĝojo kaj miro) **la blankaĵo**, kion en „Fabeloj de Andersen I“ sufiĉas por atesti mian opinion tute prava. Tamen **kio** ne taŭgas kiel relativa pronomo por la apartigita substantivo **blankaĵo**. Sekve **la blanka**, kion kaj **la blankaĵo**, kion estas same nebonaj.

Oni trovas ĉe Zamenhof multe da ekzemploj, kiuj ŝajne estas kontraŭaj al la de mi prezentita uzado de **kio**, kiel:

Fundamenta Krestomatio:

261/17 — la verko »Pasigraphie und Antipasigraphie« de J. S. Vater (Wiessenfels kaj Leipzig 1799) estas la sola, kiu havas indon . . .

Originala Verkaro:

145/29 — Nia celo estas unu el la plej grandaj kaj gravaj kiujn la homaro iam havis.

217/21 — La kajero „El la vivo de esperantistoj“ estas la lasta, kiun mi eldonis.

382/9 — la esploroj kaj sperto montris al mi, ke tia maniero de agado estas la sola, kiu plej certe alkondukos nin al nia celo.

409/18 — La nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min antaŭ vi . . .

Georgo Dandin:

50/26 — Gardu vin, kaj sciu, ke ĝi estas la lasta el viaj arogantaĵoj, kiun ni toleras.

Fabeloj de Andersen I:

112/19 — Kiel ŝi sciis, la urtikoj, la solaj, kiujn ŝi povas uzi, kreskas sur la tombejo . . .

Ifigenio en Taŭrido:

62/17 — Rigardu la al vi agrablan dramon, La plej teruran, kiun vi preparis!

Sed la neuzado de **kio** en la supre montritaj frazoj estas natura sekvo de tio, ke al la plej grandaj kaj gravaj, la lasta, la sola ktp. oni subkomprenas konkretajn celojn, kajero, maniero ktp. laŭ la kunteksto.

Tiel same **kio** ne povas rilatiĝi kun persono, ĉar ĝeneralabstrakteco, la esenca eco de o (en la korelativa tabelo), estas konceptebla nur pri la objektoj.

Marta:

37/25 — vi ne estas la unua, kiu parolas al mi en tia maniero.

H. Samuel:

XXXII/10 — tiam eĉ la plej kuraĝa, kiu havas koron, similan al la koro de leono, senkuraĝiĝos . . .

La Rabistoj:

74/16 — Kiu estas la unua, kiu forlasas sian hetmanon en la mizero?

110/11 — kaj tiamaniere ni estos la unuaj, kiuj sufokis la infanon.

Fabeloj de Andersen I:

99/10 — La solaj, kiuj ne moviĝas de sia loko, estis la stana soldato kaj la malgranda sorĉistino.

120/5 — La folion donis al mi la maljuna birdo fenikso, la sola, kiu estis en la mondo.

146/25 — la plej alta, kiu plej longe brilis en la ruĝa vespera suno, estis Parnaso . . .

Vidu: Ifigenio en Taŭrido 16/18, 96/8, Jefeŝkel XXXI/11, XXXII/24.

Originala Verkaro 69/31, 403/38.

La sola kontraŭ-ekzemplo al la nova klarigita **kio-uzado**, kiun mi trovis en la verko de Zamenhof, estas la sekvanta.

F. K. 261/17 (F. II 65/22) — La plej bona, kiun mi neniam esperis atingi, estas al mi plenumita.

Mi pensas, ke tiu ĉi kiu estus plum-

preseraro por **kio**; eĉ se ne estus tiel, ni tute ne bezonas nin ĝeni pro tio, ĉar neniu povas certigi al si Zamenhof neniam faris a careless mistake.

Finante, mi tre esperas, ke tiu ĉi malgranda traktato faros la komenton al la uzado de **kio** pli komplementa en ĉiu gramatika libro.

Notoj pri Occidental.

De Esplorinto.

Ĝis nun ni Esperantistoj sukcesis vivi en paco kun la Okcidentalistoj, kaj esperinde ni neniam revidos la akraĵn disputojn, kiuj sekvis la skismon de la Idistoj. Tamen, pro la ekziĝo de Ido, Occidental komencis varbi rekrutojn el la Idistaro, kaj ni povas atendi baldaŭan revigliĝon de la kontraŭ-Esperanta propagando. Interese estas nun vidi la eks-Idistojn ataki precize tiujn principojn de gramatiko kaj vortfarado, per kiuj verdire Ido troiĝis kaj karikaturis kelkajn taŭgajn postulojn de Esperanto (sistemeco, unusencoco). Por defendi Occidental'on ili nepre devas ataki egale forte Idon kaj Esperanton, ĉar tiuj du nun — per ironia dekreto de la fatalo! — staras kune unuflanke kaj Occidental aliaflanke; dum Novial kuraĝe, sed ŝajne senespere, entreprenis la taskon fari sintezon el ambaŭ sistemoj. Estas eble konsilinde jam nun konsideri serioze la argumentojn kaj postulojn de la Occidentalistoj. Se ni trovos necese kritikigi Occidental'on, ni penos esprimi nin objektivite kaj agi laŭ nekverlema spirito.

Por Occidental ni uzos la gramatikon de 1930, la vortaron germana—Occidental de J. Gär (Reval 1928) kaj okaze la lastajn numerojn de la ĵurnalo Cosmoglotta.

Resumante la enkondukajn vortojn de la gramatiko, ni konstatas, ke la Occidentalistoj starigas jenajn pretendojn:

1. Occidental reprezentas la „kvintesencon“ de la eŭropaj lingvoj kaj pro tio estas facile komprenebla kaj en plej mallonga tempo lernebla de 150 milionoj da homoj, dum ke Esperanto kontraŭe estas komprenebla nur de la Esperantaj adeptoj; 2. la gramatiko de Occidental estas mirinde simpla, regula kaj plene moderna; 3. per sia „analitika“ strukturo Occidental obligas al eŭropanoj korekte paroli ĝin kvazaŭ laŭinstinkte.

Tiuj asertoj kompreneble starigas aron da diskutablaj tezoj, inter kiuj la plej gravaj eble estas:

1. Ĉu Esperanto estas kompare kun Occidental ne nur malpli rapide komprenebla a) de eŭropanoj bone edukitaj, b) de eŭropanoj sen lingvaj scioj, c) de ekstereŭropanoj, sed ankaŭ malpli facile lernebla kaj uzebla de ĉiuj tiuj kategorioj de lernantoj?

2. Ĉu Occidental vere reprezentas la „kvintesencon“ de la eŭropaj lingvoj? t.e. unuflanke, ĉu ĝi havas sufiĉan provizon de internaciismoj por pravigi tiun aserton, kaj aliflanke ĉu ĝi allasis neinternaciajn esprimojn, esprimmanierojn kaj vortkunmetaĵojn? Ĉu ĝi povus esti ankoraŭ pli internacia?

3. Ĉu la gramatiko de Occidental estas vere tute simpla kaj regula?

4. Ĝenerala demando: ĉu reguleco en la ortografio, prononco, morfologio kaj vortfarado estas faktoro almenaŭ tiom grava por la lernanto kiom la plej riĉa kaj luksa internacia vortaro, aŭ ne?

5. Eĉ se la respondo al 4. estas jesa, ĉu la Okcidentalistoj rajtas aserti, ke la inter-

naĉiaj vortoj estas naturaj elementoj de la fundamenta strukturo de Occidental, dum ke en Esperanto ili restas „fremdvortoj“? Se jes, ĉu la apartigo de du tavoloj aŭ klasoj de esprimoj ankaŭ en internacia lingvo estas nepre kondamninda?

(Daŭrigota.)

LINGVA TRIBUNO

Tonelo, tuno, tino.

Pri la artikolo en Esperanto rilate al nova franca 40 000 Ta. Sipo „L'Atlantique“ en la lasta bulteno de la Franca Cambro de Comercio en Londono, mi deziras sciigi, kial mi uzis la radikon **tonel'** anstataŭ **tun'**.

S-ro Rollet de l'Isle uzis **tono** por la angla vorto **ton** en sia „Marista Terminaro“, sed **tono** ŝajnas al mi netaŭga, ĉar ĝi signifas sonon. Fulcher & Long alprenis la vorton **tuno** por **ton**, kaj **fino** por la fiŝo nomita greke: **thunnon**, angle: **tunny**, germane: **Thunfisch** kaj france: **thon**, sed **tino** ne konvenas tiucele, ĉar ĝi jam signifas, laŭ la Plena Vortaro, specon de kuvo. Laŭ s-ro Guéritte, **tuno** estas la ĝusta termino por „thunnon“, „thon“, kaj mi plene konsentas kun li. Tiamaniere oni evitus dusencaĵon, ĉar ĉiu el la vortoj **tonelo**, **tono**, **tino** kaj **tuno** havus nur unu signifon.

Cetero, la termino **tonelo** estas tute internacia, kiel oni povas vidi, konsultante la Maristan Terminaron „From keel to truck“ de Paasch, eldonitan en kvin lingvoj: angla, franca, germana, hispana kaj itala.

Pripensante taŭgan terminon, oni pravde agas konsiderante la terminojn uzatajn en kelkaj el la ĉefaj eŭropaj lingvoj. Mi do enmetas elkopiaĵon el la citita terminaro*) pri la vorto **tonelo** kaj ties derivaĵoj, post kiam mi aldonis sesan kolonon por Esperanto-vortoj, kiujn mi proponas. Oni rimarku, ke **tonelajo** estas plej proksima parenco de **tonelaje** (hisp.) kaj **tonnellaggio** (ital.).

En la Scienca Fundamenta Esperanta Terminaro ĵus eldonita de I.S.A.E., oni trovas la esprimon **tonelo metra**, kun kiu mia propono akordiĝas.

Mia opinio, **tonelo** estas akceptinda ĉu metra, ĉu alisistema, kaj pro la supreciita, konfuza signifo de **tuno**, fina interkonsento pri ĉi tiu punkto estas dezirinda.

En „Esperanta Praktiko“, 1927, paĝ. 180, estas artikolo en kiu s-ro Orengo aprobis **tonelo**. Se mi ne eraras, s-ro Grosjean-Maupin ankaŭ aprobis ĝin kaj intencis proponi la radikon **tonel** por la 4-a Oficiala Aldono.

Kion la interesatoj opinias pri la afero?

P. Le Brun.

*) Pro manko de loko ni devis rezigni ĝian publikigon. — Red.